N-ro 1 – Decembro 2018

# VENTO

Veksilologia revuo en Esperanto



# VENTO

## Veksilologia revuo en Esperanto

Eldonita de Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo

kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Adreso: esperanto14@ono.com

ENHAVO

Jen nova revuo ………………………………………………… 3

La Sahara Standardo …………………………………………….. 5

Kiel loki nian standardon ………………………...…………… 8

Lastaj informoj pri standardoj ………………………………… 10

Hisado de Esperanto-Standardo en Andaluzia Gimnazio …….. 14

Flagoj de seksaj komunumoj …………………………………….. 15

La Angulo de la Blazonoj: Andoro …………………………… 20

Kiel kunlabori kun VENTO …………………………………... 21

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentataj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta Homaro.*

# *Jen nova revuo*



Antaŭ dudeko da jaroj, kiam interreto ekebligis kontaktojn inter divers-landaj homoj, grupeto de esperantistoj kreis dissendo-liston por paroli pri standardoj kaj ni, duon-ŝerce duon-serioze, oficialigis la grupon V.E.N.T.O. (tiame: Veksilologia Esperantista Ne-formala Tutmonda Organizo). Okaze de la mesaĝoj tiam senditaj, ni parolis pri simboloj, koloroj, signifoj, novaĵoj kaj ĉiam rilate al veksilologio. Sed kio estas veksilologio?

Iom lakone *Plena Ilustrita Vortaro* diras, ke veksilologio estas flagoscienco. Verdire ĝi pravas, kvankam tiu difino estas tro malriĉa. Veksilologio, ja ankaŭ nomata flagoscienco, estas scienco helpanta la historiistojn kaj ĝi okupiĝas pri flagoj, standardoj kaj similaj insignoj. Kaj oni povus aldoni, ke ĝi helpas ne nur historiistojn ĉar ĝi ankaŭ rilatas al sociologio kaj ĝenerale ĝi helpas al ĉiuj esploristoj kiuj emas kompreni la homajn grupojn.

Hodiaŭ naskiĝas nova revuo kiu pritraktos veksilologiajn aferojn en la internacia lingvo esperanto. Ni disvastigos ĝin per interreto, tiel estos eble havigi niajn artikolojn al ĉiuj interesitoj ĉiuloke. Eldoni paperan revuon, nepre tutkolora pro la temo pritrakota, estus maleble el la ekonmia vidpunkto. Tamen, se ni uzas interreton ĝi povos esti realigebla projekto kaj espereble sukcesa. Tiu antikva dissendo listo nomita VENTO hodiaŭ estas nova revuo kun tiu sama nomo, kvankam ni ŝanĝis la signifon de tiu akronimo per *Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo.* Krome, la nomo ja taŭgas ĉar la vento estas esenca elemento por vivigi standardon kaj *per facila vento* nia lingvo celas diskoniĝi tra la tuta mondo.


Nia celo estas aperigi kvar numerojn jare. Ili estos tute senpagaj por ĉiuj interesitoj. Male, ni petas la kunlaboron de ĉiuj kiuj amas standardojn kaj ĝenerale insignojn pere de la sendado de informoj, fotografaĵoj, artikoloj, ktp.

Ni esperas, ke Vi ĝuos ĉi tiun unuan numeron de nova revuo, kiu nur celas esti la unua paŝo de longa vojo.

*José María Rodríguez Hernández*

*Andaluzio – Hispanio*

*Veksilologia Esperantista Tut-monda Organizo*




Memoru, ke laŭ rekomendo de Universala Esperanto-Asocio, ĉiuj Esperanto-flagoj estas verdaj, escepte de la blanka kvadrato enhavanta la veredan stelon, kaj ili devas konformi al jenaj proporcioj.

# *La  Sahara Standardo*

Kvankam ne temas pri ŝtato agnoskita de la tuta internacia komunumo, oni devas diri, ke la Araba Demokratia Sahara Respubliko estas oficiale akceptita de pli ol 50 ŝtatoj.  Kiam Hispanio forlasis tiun teritorion fine de la jaro 1975, post la “Akordo de Madrido”, Maroko okupis la nordan parton de la teritorio kaj Maŭritanio trionon en la sudo.  Tuj poste, la Fronto-Polisario, organizo reprezentanta la saharan popolon, proklamis la sendependiĝon de la eksa hispana kolonio en la nord-okcidento de Afriko.



La standardon de Sahario oni kreis en la jaro 1973 de I-Ŭali-Mustafa Sajjid (1948-1976), unu el la ĉefaj fondintoj de la Fronto-Polisario kaj unua Prezidento de la Araba Demokratia Sahara Respubliko.  Li mortis dum gerila agado en Maŭritanio.  La koloroj kaj eĉ la formo estas bazitaj sur la standardo de la araba ribelo de la jaro 1916 kontraŭ Turkio, kiu celis krei araban ŝtaton el Sirio ĝis Jemeno, kvankam post tiu ribelo okazis la kolonian dividon de la arabaj teritorioj inter la eŭropaj ŝtatoj Francio kaj Britio post la unua mond-milito.  La koloroj de

la standardo uzita dum tiu ribelo estis poste la bazo de multaj nuntempaj arabaj standardoj, kiel tiuj de Irako, Sirio, Egiptio, Jordanio kaj Palestino.  Konkrete, la sahara standardo estas tute simila al tiu de Palestino, kvankam oni aldonis du pliajn elementojn: ruĝaj stelo kaj luno.



Sahara standardo ondumas en la kampadejoj de la sudo de Alĝerio

Rilate la signifon de la koloroj estas jena:

Ruĝa triangulo:  reprezentas la sangon verŝita de la herooj.

Nigra strio:  montras la doloron de la sahara popolo kaj la funebron omaĝe al tiuj kiuj mortis cele la sendependiĝon de Sahario.

Blanka strio:  la pacon dezirata de la sahara popolo.

Verda strio:  memorigas la esperon de la sahara popolo krei propran ŝtaton.

Ruĝaj luno kaj stelo:  montras, ke Sahario apartenas al la islama kulturo.



De tempo al tempo kaj pro la historia rilato inter Hispanio kaj la Sahara Respubliko, la sahara standardo pendumas el la balkonoj de hispanaj urbodomoj, por memori la lukton de la sahara popolo cele la sendependiĝo.

Jen la nuntempa standardo, tamen kiam Sahario atingos sian kompletan sendependiĝon la nigra strio, reprezentanta la suferon de la popolo, kiu nuntempe aperas supren de la simbolo okupos, la suban parton, do la espero, montrata de la verda strio, iros supren.

Kunlaboru kun **VENTO**

La revuo aperas kvar-foje en la jaro.  La venonta numero aperos komence de la monato Aprilo 2019.  Se Vi deziras kunlabori kun ĉi tiu projekto, sendu Vian artikolon, informon, fotografaĵon, ktp antaŭ la 15-a de marto 2019 al:

esperanto14@ono.com

# *Kiel loki nian standardon?*

Se paroli pri la organizado de E-aktoj, ni ne devus forgesi la protokolajn regulojn rilate la lokigon de standardoj. Ofte al niaj universalaj kaj eĉ al naciaj kongresoj ĉeestas politikaj reprezentantoj de la urbo aŭ la ŝtato kie okazas la esperantista renkontiĝo kaj ni devus obei tiujn regulojn kiuj, laŭ la nacia protokolo, decidas kie lokigi unu aŭ alian standardon. Kompreneble, oni devas diri unue, ke ne en ĉiuj partoj de la mondo oni sekvas la samajn regulojn rilate la protokolon, tamen jen la plej internaciaj se oni parolas pri ĉi tiu temo.

Hodiaŭ ni parolos pri la lokigo de flagoj ĉe la kunvenejo, specife pri la enirejo kaj post la prezida tablo.

<u>Prezida tablo:</u>

Se enestas 2 standardoj, ekzemple tiu de la ŝtato kie okazas la kongreso kaj la esperanto-flago, jen la lokigo:





Se oni aldonas pliajn standardojn, ekzemple tiuj de la urbo, de la regiono, de Eŭropa Unio, jen la lokigo:




En ĉi tiu kazo la normala ordigo estus:

1) Ŝtato 2) Regiono 3) Urbo 4) Eŭropa Unio / Kontinenta organizo 5) Esperanto

Se ni parolas pri la enirejo en la kongresejon, tio estas ne post la prezida tablo, la plej grava standardo okupos la lokon plej proksima al la enirejo kaj apud ĝi, sinsekve, la ceteraj standardoj laŭ jene:




La plej ofta ordigo estus, kiel jam dirite:

1) Ŝtato 2) Regiono 3) Urbo 4) Eŭropa Unio / Kontinenta organizo 5) Esperanto

Se nur ondumas ĉe la enirejo la standardoj de la ŝtato (aŭ nur tiu de la regiono aŭ de la urbo) kaj tiu de la esperanto-movado, la plej proksima al la enirejo estos tiu de la ŝtato kaj sekve la esperanto-flago.

# *Lastaj Informoj pri Standardoj*

## Nova Standardo de Maŭritanio.

Dum la jaro 2017 la mauritana Prezidento Mohamed Ould Abdel Aziz proponis kelkajn ŝanĝojn en la Konstitucio, inter ili la ŝanĝo de la nacia standardo. Tiel, okaze de referendumo okazita la 6-an de aŭgusto 2017, oni aprobis novan standardon. Al la tradicia standardo, jam adoptita post la sendependiĝo en la jaro 1959, oni aldonis du horizontalajn ruĝajn striojn en la supra kaj en la suba parto de la flago. Ambaŭ strioj reprezentas la sangon de tiuj kiuj luktis cele la sendependiĝon de Maŭritano.



Nova maŭritana standardo

## Transnistrio adoptis oficiale la rusan flagon.

La Suprema Konsilio de la Transnistria Respubliko aprobis la proponon de la Registaro adopti la tri-koloran flagon de Rusio kiel duan nacian standardon de ĉi tiu teritorio. Laŭ la nova leĝo la rusa standardo ondumos en ĉiuj oficialaj konstruaĵoj kaj ĝi estos uzata okaze de naciaj ceremonioj.

La politika rango de ĉi tiu eksa soveta respubliko, kiu ankoraŭ uzas oficiale la tiaman sovetan standardon, ne estas tute klara. Jure Transnistrio apartenas al la Moldava Respubliko, tamen fakte temas pri tute sendependa respubliko, kvankam ne internacie agnoskita, pro la fakto ke ili posedas propran registaron, parlamenton, armeon, policon kaj eĉ monunuon. La plejmulto el la enloĝantoj posedas la moldavan civitanecon, tamen ankaŭ troviĝas tie rusoj kaj ukrainoj.



Standardo de la Transnistria Respubliko



Nova dua Standardo

## La standardo de la Atolo Bikino memoras la nuklean respondecon de Usono.

La atolo Bikino troviĝas en la Marŝala Insularo -Pacifika Oceano-, sendependa ŝtato libere asociita al Usono. Usono en la jaro 1946 devigis la enloĝantojn forlasi la teritorion, ĉar ĝi estus uzata kiel laboratorio por atom-bombajn provojn. La originalaj bikinanoj nuntempe troviĝas ĉe en la insulo Majuro, kie eĉ ekzistas oficiale la urbodomo de la “ekziliita” Bikino. Ĉi tiu urbodomo adoptis oficiale la standardon de la bikina atolo. Ĝi aspekte similas al la usona flago, kvankam sur ĝi aperas 23 steloj, memore al la 23 insuletoj de la atolono. Aperas ankaŭ 3 nigraj steloj, memore al tiuj 3 insuloj kiuj estis tute malaperigitaj post la eksplodo de atom-bombo en la jaro 1954. Du pliaj nigraj standardoj omaĝas la lokojn kiuj nuntempe troviĝas la eksaj enloĝantoj de Bikini.

Ankaŭ aperas sur la standardo jena devizo: *MEN OTEMJEJ REJ ILI BEIN ANIJ* (ĉio restas en la manoj de Dio). Temas pri la respondo de la estro de Bikini kiam li ricevis la ordonon de la Usona reprezentanto forlasi la atolon.

Pere de ĉi tiu standardo, kiu estas tute oficiala, la bikinanoj celas memorigi al la usona registaro la respondencon, kaj socian kaj ekonomian, pro la deviga ekziliado de la bikinaj enloĝantoj kaj la necesajn mon-kompensojn ricevendajn pro la nuklea malpurigo de la atolo.




**Bolivio kreas oficialan standardon por sia mara postulo.**

Inter la jaroj 1879 kaj 1883 okazis milito inter Ĉilio, Bolivio kaj Peruo, kies fina rezulto estis la perdo de regiono apud la Pacifika Oceano fare de Bolivio. Ekde tiam ĉi tiu sudamerika ŝtato reklamas sian rajton rekuperi tiun teritorion, eĉ minimuman parton, kaj ebligi ĉi tiel la rektan aliron de Bolivio al la maro.

En la jaro 2017 la Bolivia parlamento aprobis leĝon kiu oficialigas la standardon de la mara postulo de Bolivio kun la celo montri sian deziron atingi tiun aliron al la Pacifika Oceano. Sur la standardo aperas supren la du oficialajn boliviajn flagojn, tiu historia kaj ankaŭ la flago de la ajmara popolo. Ĉirkaŭ ĉi tiuj du standardoj troviĝas flavaj steloj, reprezentantaj 9 boliviajn regionoj. Aperas ankaŭ izolita alia stelo, kiu estas la perdita regiono kiu ebligus la bolivian aliron al la maro. La standarda fono estas blu-kolora kaj ĝi reprezentas la maron.

En oktobro 2018 la Internacia Justica Kortumo en Den Haag rifuzis la peton de Bolivio kaj deklaris, ke Ĉilio ne estas devigata intertrakti kun Bolivio por trovi solvon al la mara postulo de ĉi tiu ŝtato.



Sur ĉiu numero ni aperigos fotografaĵon de unu el niaj legantoj. Sur ĝi devas aperi standardo. Atentu la fotografaĵo devas esti originala kaj oni devas sciigi pri la loko, kaj se eble la dato, de la bildo. Bv. sendi Vian fotografaĵon al: esperanto14@ono.com kun la indiko: *"Fotografio de standardo".*



Ambasadejo de Kataro en Parizo, tuj apud la Triumf-Arko.

Monato julio 2007. Aŭtoro: *José María Rodríguez (Hispanio)*

# *Hisado de Esperanto-flago en Andaluzia Gimnazio*



Esperanto-standardo ondumis la pasintan 14-an de decembro en la Gimnazio “Almenara” en Velez-Málaga (Andaluzio-Hispanio). Fabián Jiménez, profesoro en tiu lernejo kaj membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, organizis prelegon kaj feston honore al la internacia lingvo en ĉi tiu gimnaZio. Ĉiuj gelernantoj ankaŭ estis invitataj gustumi tipan andaluzian matenmanĝon. Dum la festo ankaŭ honore oni hisis nian standardon en la lernejo.

# *Flagoj de seksaj komunumoj*

La ĉielarka standardo aperis komence de la 70-jaroj por reprezenti kaj igi videbla la gejan komunumon en la urbo San-Francisko. Nuntempe ĝi estas unu el la plej agnoskitaj simboloj, tamen ĝi ne estas la sola standardo de komunumoj bazitaj sur seksaj inklinoj. Jen aliaj ne tiel konataj:

**AMBAŬSEKSEMA KOMUNUMO:**



Temas pri la seksa orientiĝo de iu, kiu spertas seksuman kaj emocian allogon al personoj de ambaŭ seksoj. La flagon dezajnis Michael Page kiu klarigis, ke la blua koloro reprezentas la allogon al alia sekso, male la roza koloro montras la inklinon al propra sekso. La miksiĝo de ambaŭ koloroj, tio estas la altiro al ambaŭ seksoj, aperigas la violan koloron, kiu troviĝas meze de la standardo.

**TRANSGENRA KOMUNUMO:**

Temas pri tiuj homoj kun malakordo inter sia socia sekso kaj sia biologia sekso. La flagon dezajnis Monica Helms en la jaro 1999, kvankam ĝi ne estas la sola standardo reprezentanta ĉi tiun

komunumon, tamen ja la plej uzata. La koloroj de la flago reprezentas la tradiciajn kolorojn de la infan-aĝo: blua por infanoj, roza por inoj kaj meze de ambaŭ troviĝas la blanka koloro montranta neniun el ambaŭ genroj. La horizontalaj strioj sciigas, ke ĉiu seks-allogo adoptita estas tute ĝusta.



Transgenra standardo

**NENIUSEKSEMA KOMUNUMO:**

En la jaro 2009 la usona asocio de neniuseksemuloj, kie ariĝas homoj kiuj sentas nenian seksan allogon, decidis krei standardon por identigi ĉi tiun komunumon dum geja parado en San-Francisko. La adoptita standardo montras la kolorojn nigra (neniuseksemo); griza (duon-seksemo); blanka (seksemo) kaj viola (komunumo).



Standardo de la Neniuseksema Movado

**INTERSEKSA KOMUNUMO:**



Interseksuloj estas tiuj homoj kies reprodukta sistemo ne akordas al sia genro. La koloroj uzataj en la standardo: flava kaj viola estas la kontraŭaj koloroj al tiuj ofte uzataj por reprezenti virojn kaj virinojn (blua kaj roza). La cirklo montras la integrecon kaj kompletecon de la interseksuloj.


**ĈIASEKSEMA KOMUNUMO:**



Ĉiaseksemulo estas homa seksa orientiĝo karakterizita de la sentimenta, estetika, romantika aŭ seksa allogo sendepende de la genro aŭ sekso de aliaj personoj samkiel ĉia seksa praktiko. La blua koloro de la standardo reprezentas la seksan allogon kun homoj, la roza al virinoj

kaj meze troviĝas la flava koloro de tiuj kiuj sentas allogon sendepende de ambaŭ genroj.

### LESBA KOMUNUMO:



Lesbo aŭ lesbanino estas virino kiu preferas seksajn kaj romantikajn rilatojn nur kun aliaj virinoj. Ne ekzistas komuna akordo por oficialigi la standardon de la lesba movado. En la jaro 1999 aperis jena flago, kie videblas nigra inversigita triangulo, simbolo uzata de la nazioj por signi la kontraŭ-sociajn virinojn. Ene de la triangulo troviĝas du-flanka hakilo, simbolo de la matriarkaj socioj. Fone la viola koloro omaĝas la feminisman movadon.

### SADOMASOĤISMA KOMUNUMO:



Sadomasoĥismo estas la plezuro kiu derivas de agoj implikantaj la ricevon kaj/aŭ la okazigon de doloro kaj/aŭ humiligo. La aŭtoro de la standardo deklaris, ke ĉiu homo rajtas doni kaj kompreni propran signifon al koloroj kaj simboloj aperantaj en la flago de ĉi tiu movado.

**KOMUNUMO DE URSOJ:**



Temas pri subkulturo ene de la geja komunumo. Temas pri gejoj kun fortika korpo kaj faciaj kaj korpaj viloj. La ursoj emas al vireco kaj multfoje malakceptas la inemon de aliaj gejoj. La flago reprezentas la integriĝon de ĉiuj rasoj, pere de la kunfandiĝo de la haŭtoj de malsimilaj bestoj, kies haŭtaj koloroj aperas sur la flago. La ŝpuro apartenas al urso, kiu nomigas ĉi tiun movadon.

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

# *La angulo de la blazonoj*



Meze de la andora standardo troviĝas bela blazono. La standardo estas kunfandiĝo de tiuj hispana kaj franca, ĉar ĉi tiu malgranda ŝtato troviĝas kaj estas protektata de Francio kaj Hispanio. Krome temas pri kun-priclando, kies ŝtatestroj estas la Episkopo de La Seu d'Urgell en Hispanio kaj la Prezidento de la Franca Respubliko. La dezajnon de la flago oni aprobis en la jaro 1866. Meze de la standardo troviĝas la blazonon de la ŝtato.

La signifo de la elementoj aperantaj sur la blazono estas jena:




Supre - Suben / Maldekstre – Dekstren

**MITRO** reprezentanta unu el la kunprincoj, tio estas: la episkopo de La Seu d'Urgell.

**TRI RUĜAJ STRIOJ SUR FLAVA FONO**

Temas pri la blazono de la franca graflando Foix, apud Andoro.

**KVAR RUĜAJ STRIOJ SUR FLAVA FONO**

Ili reprezentas la blazonon de la aragona regno-lando.

**DU BOVINOJ** reprezentas la vic-graflandon Bearn.

Sur la suba parto de la blazono aperas latin-lingve la frazo *VIRTUS UNITA FORTIOR* (La virto unuiĝinta estas pli forta).

Kiel kunlabori kun **VENTO:**

- Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti verkitaj en la internacia lingvo Esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj, ili devas aperi ankaŭ ene de standardo por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

- Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditaj de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas ne temas pri fotoj prenitaj el interretaj paĝoj. Sur tiuj fotografaĵoj devas aperi standardo(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ la dato, de la fotografaĵo.

- Okaze de la sendo de artikolo aŭ informoj pri standardoj la aŭtoro devas eviti fari aprobajn aŭ mal-aprobajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo aŭ regiono de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn internaciajn aferojn aŭ movadojn.

- La revuo estas tute senpaga, do pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas neniun kontraŭ-pagon. Kompreneble la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn komence de la artikolo.

Kiel membriĝi en **V.E.N.T.O.**

- Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo deziras esti la organizo de la Esperanto-Movado rilatanta al veksilologiaj aferoj. La aliĝo al ĉi tiu asocio estas tute sen-paga. Estontece, kaj se ni atingas sufiĉan nombron da aliĝintoj, ni petos nian eniron en UEAn kiel fakan asocion. Por aliĝi al la asocio Vi nur devas sendi mesaĝon al nia adreso: esperanto14@ono.com


VENTO
Via veksilologia informilo en
ESPERANTO